# HEJS

BULTENO DE

HISPANA ESPERANTO ★ JUNULARA SEKCIO

Nro. 32
Septembro - Oktobro 1963

REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY
POŜTKESTO 26
Arce, 8, 2.°, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo



*Lago "Ratera" (Pirineo) Foto, J. Belza, U. E. C. Collblanch*

## ESTRARA KUNVENO DE H.E.J.S. EN SABADELL 

Malgraŭ la deziro de la estraro de H.E.J.S. okazigi la laborkunsidon dum la 2-an H.J.E.K, lastmomente oni devis fermi la junularan kunvenon pro la necesa partopreno de la gejunuloj al aliaj aranĝoj de la 24-a H.K. Tial privato la estraranoj interkonsentis en nova kunvono, kun la celo diskuti kaj trakti ĉiujn punktojn de la tagordo aperinta en la numero 30-a de nia bulteno.

Partoprenis al la kunveno la jenaj estraranoj kaj kunlaborantoj: F-inoj Mª Teresa Magriá, kaj Magencia Garcia, S-roj C. Bello, A. Mimó, R. Alberich, A. Tomasa, S. Aragaj kaj L. Puig nome de la E-grupo de Sabadell.

Post duhora amika diskutado oni aprobis la jenajn punktojn:

a) Transdoni al S-ro Antonio Tomasa, vic-prezidanto la taskon de la kampanjo NEO.
b) Nomi S-ron Carlos Sainz gvidanto de la studenta fako de H.E.J.S.
c) Nomi S-inin Amparo Garcia gvidantino de la Filatelia Fako de H.E.J.S.
d) Fondi sekretariejon de la Kataluna Delegacio de H.E.J.S. Gvidos ĝin S-ino Magencia Garcia.
e) Eldoni ankaŭ specialan numeron de H.E.J.S. dediĉita al scienco, literaturo aŭ sporto.
f) Aprobi la Kontrakton de Germana Esperanto Junularo kaj H.E.J.S.
g) Akcepti la inviton de Franca Fervojista Esperanto-Asosio. Konsekvence se iu H.E.J.S.-an(in)o deziras partopreni la Generalan Kunvenon de la menciita asocio, bonvolu komuniki ĝin al la Redakcio de H.E.J.S. La Kunveno okazos en Decembro dum la lasta semajno kaj komence de la nova jaro.

La Redakcio petas indulgon al la legantoj por la forgeso de tiun ĉi sube raporton, kiu kompreneble devis aperi en la antaŭa bulteno kun la listo de la H.E.J.S.- Estraro.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Sukcesan evoluon de la Jaro de la Junularo aŭguris fondiĝo de Landaj Sekcioj de TEJO en Belgujo, Japanujo kaj Usono, al kiuj poste aldoniĝis ankaŭ Aŭtrujo. La kulminan de la Jaro signis la 19-a Internacia Junulara Kongreso-la plej imponа ĝis nun.La kongreso kunvenigis pli ol 550 gejunulojn el 22 landoj de Afriko,Ameriko,Azio kaj Europo, Per tio TEJO finfine plene pravigas sian nomon tutmonda.

Okaze de privata kunveno de s-ro Uwe Joachin prezidanto de G.E.J. kaj s-ros S. Aragaj prezidanto de H.E.J.S., dum la tagon 16-an de aŭgusto, oni planis specialan kontrakton inter la du menciitan junularaj sekcioj de Germana Esperanto Asocio kaj Hispana Esperanto Federacio respektive.

Poste la estraro de H.E.J.S. aprobis la kontrakton dum la estrara kunveno de H.E.J.S. en Sabadell dum la tagon 25-an de la sama monato; tiel do, por la oficialigo kaj subskribo de ĝi nur mankas la aprobon de la estraro de G.E.J.

Tamen supozante ke ĝi certe aprobos, ni publikigas ĉi-su be la menciitan kontrakton kun la intenco ŝpar' tempon kaj komenci nian agadon baze de la indikitaj punktoj.

Unue ni ankaŭ publikigas informojn pri la funkciado kaj organizado de G.E.J.; tiel la legantoj scios kaj komprenos perfekte la nunan staton de G.E.J. kaj ĝian agadon.

G.E.J. Enhavas 200 membrojn abonantojn al la Revuo Germana Esperanto.
Dum la antaŭa jaro ekeldonis germanajn informilojn pri Esperanto por la neesperantistaj societoj. Venotjare intencos eldoni 4 numerojn.
Estis organizita la jaron 1948-an, tiel do ĝia jaraĝo estas 15.
Rilatiĝas kun la aŭtoritatuloj tre bone, pasintjaro ricevis de la Ministerio pri junularaj aferoj 50.000 pesetojn. Por tiu ĉi jaro oni petis 65.000 pesetojn. Unuvorte ne ekzistas financan problemon.
Ankaŭ havas tre bonajn rilatojn kun aliaj landaj junularaj organizoj.
Kiel H.E.J.S. estas la junulara sekcio de Esperantista Landa Asocio.
Ne eldonas apartan bultenon; G.E.J. utiligas du aŭ tri paĝojn de revuo Germana Esperanto, kiu aperas monate.
Estis organizitaj la jenaj fakoj: Korespondа Servo. Informa Fako. Biblioteko. Sombonda Fako ka[j] Eksterlandaj Aferoj.

-o-o-o-o-o-o-o-

KONTRAKTO

a- Laŭ niaj eblecoj, plenumi la Kontrakton de Istad kaj la Deklaro de Wokingham.

b- Interŝanĝi 6 revuojn de G.E.A., por 6 H.E.J.S.-bultenoj aŭ de la Federacio.

c - Anonci niajn respektivajn revuojn en niaj oficialaj organoj.
d - Interŝanĝi gejunulajn gastojn (se eble ) inter esperantistaj familioj
c - Interŝanĝi respektive niajn statutojn.

-o-o-o-o-o-o-o-

Komentario. La punkto plej interesa sendube estas (d) pro la graveco ni atentigas al ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras gastigi germanajn gejunulojn, bonvolu indiki al la Redakcio siajn eblecojn.

Same ni petas al ĉiuj interesuloj vojaĝi al Germanujo indiku precize: daton, sekson, profesion, jaraĝon, k.t.p.

-o-o-o-o-o-o-o-

## EKSKURSA FAKO

Pasinta ekskurso. Tago, 22 de septembro. Tra la montaro MONTSENY.

Vojplano. Figaro. Vallcarcara, C. Bosc kaj Tagamanent.

Partoprenis: S-inoj. Magencia Garcia, Teresa Girona, Josefina Girona de Aragaj, Mª Merce kaj Josep Bonete, Eduar Sateras, Ricart Gómez, Jordi Gumá kaj S. Aragaj.

-o-o-o-o-o-o-

## KORESPONDA FAKO

Deziras korespondi.

19-jara angla studento, s-ro Roberto Sheed
3 Langham Gardens, Edgware, Middx. Anglujo.

Fraŭlino Denise Clero Aŭ Bourg.
Ouroux-en Morvan (Niévre) Francujo.

18-jara fraŭlino Mª Blanca Yglesias
Barrio Estación. Alar del Rey (Palencia) Hispanujo.

30-jara.S-ro Ramón Canadell. San Pedro 17
Moyá (Barcelona) Hispanujo

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

IOM PRI LA E-MOVADO EN AZIO    Armand Su

Post 2 jaroj, en 1965, la 50-a Universala Kongreso de Esperanto okazos por la unua fojo en Azio, nome en Tokio, la ĉefurbo de Japanio, kiu estis kaj hodiaŭ ankoraŭ estas la centro de E- movado en Azio. Jam antaŭ 40 jaroj, en Japanio estis fondita Japana Esperanto-Instituto kiel la unua E-organizajo en la tuta Azio. La 50-a U.K. ne nur signifos la triunfon de Esperanto en Japanio, sed ankaŭ en la tuta Azio.

Sed kia estas la nuntempa E-movado en la ceteraj partoj de Azio ? Ni jomete ekrigardu:

BIRMO  La unuaj informoj pri Esperanto kaj D-ro L.L. Zamenhof aperis en la n-ro 1 de 1959 de la angla-lingva hobi-bulteno, eldonita en Rangun.Sed pliaj informoj pri Esperanto mankas.

CEJLONO  Tie troviĝas Budahna Esperanto-Instituto, kies direktoro estas la Budhana Monsho Ven C. Nianassatta Thero. Dank al D-ro Victor Sadler, speciala sendito de UEA al Cejlono, estis fondita Cejlona Esperanto-Asocio fine de septembro de 1962.

ĈINIO  Ĉina Esperanto-Ligo estis refondita en 1957, kaj eldonas la dumonatan revuon "El Popola Cinio" kaj literaturajn kaj politikajn verkojn en Esperanto. Dum la lastaj jaroj estis eldonitaj ankaŭ lernolibroj kaj lego-libroj de Esperanto kaj unu Esperanta-Ĉina Vortaro.

HINDUJO  Dank'al S-ro Tibor Sekelj kaj S-ino Haudebine la E-movado reviglîĝis en tiu ĉi vasta lando ekde 1956. La unua E-grupo "Esperanto-Societo de Bombaj" fondiĝia en - 1957. En 1958 fondiĝis Sudazia Esperanto-Federacio, kiu eldonas dumonatan revuon "Sudazia Bulteno". Regule E-Kursoj okazis en Bombaj, New Debli kaj aliaj urboj. En 1960 estis fondita Esperanto-Societo de Kalkuta. En 1962 en New Dehli estis fondita Hinda Instituto de Esperanto.

INDONEZIO Indonezia Esperanto-Asocio estis fondita en 1961 kaj nun eldonas kvaronjaran revuon "Voĉo el Indonezio" La Asocio havas grupojn en pli ol 10 urboj. En 1960, en Djakarta okazis la unua kongreso de Indoneziaj Esperantistoj kaj okazis samtempe la unua E-Ekspozicio. Cetere, estis fondita ankaŭ Indonezia Esperanto-Instituto en Semarang, kiu eldonas la duonjaran revuon "Indonezia Esperantisto" (provizore ne aperas). En 1961 la Instituto eldonis "Fundamento de Esperanto" de D-ro Zamenhof en Indonezia traduko de s-ro Liem Tjong Hie.

ISRAELO Esperanto-Ligo en Israleo estis fondita en 1949. Ĝi eldonas la revuon "Nia Liriko". Ĉiujare okazas ankaŭ landa kongreso. E-kursoj okazis en diversaj urboj E-Ekspozicioj okazis en Jeruzalemo, Kfar-Ata kaj aliaj urboj. Israelo estas la unika azia lando, kju havas Zamenhofstratojn (unu en Nova Bialistok, la alia en Kfar-Ata).

KOREO (norda) En la ĉefurbo Pjongjong estis fondita Korea Esperanto-Asocio (P.O. Kosto 16). La unua korea numero de "Paco", Organo de Mondpaca Esperantista Movado estis eldonita de koreaj esperantistoj en 1960. Krome Radio Pjongjong elsendas duonhoran E-programon ĉiumerkrede.

KOREO (suda) La landa E-organizajo ne estas. En Taegu estis fondita Tsegu College Esperanto-Instituto kaj Korea Junulara Esperanta Asocio, kiu eldonas monatan gazeton "Korea Junularo" ekde 1958.

LIBANO Dank' al famkonata dana esperantisto Prof. D-ro Paul Neergaard, kiu ekde la unua de septembro 1959 ekinstruis kiel profesoro de semteknologio en la Amerika Universitato de Beirut, malfermiĝis ankaŭ E-kursoj tie. Dank'al lia porosperanta laboro, estis fondita Libana Esperanto-Asocio en 1960. Ĝia prezidanto estas nun s-ano Salah Cthanem.

NEPALO Dank'al specialaj senditoj de UEA s-roj Tibor Sekelj kaj Simo Milojeviĉ, la E-movado ekĝermis en tiu ĉi lando ĉe Himalajo. En 1961 estis fondita.Esperanto-Societo de Kathmandu. Okazis 6 porkomencantaj kaj unu daŭriga kursoj de Esperanto en la lernejoj de Karhmandu kaj en la Kolegio de Patan. Pli ol 200 nepalaj gestudentoj partoprenis la Kursojn. La instruisto estis s-ro S. Milojeviĉ. La lernanto de s-ro Tiber Sekelj, Shree Prashad Shrestha fariĝis la unua nepala delegito de UEA en Kathmandu (nun li studas en Israelo).

PAKISTANO Ne estas E-organizajo. En 1960, la sveda esperantisto s-ro Einar Agholm estis sendita al Pakistano. Tie li instruis Esperanton al 8 studentoj. Nun la E-Movado ekĝermis ankaŭ en Pakistano.

TURKIO Ne estas E-organizajo. Nur dekoj da individuaj esperantistoj. La peranto de UEA estas S-ro Rasan Kocaman.

<u>VJETNAMIO</u> (norda) En 1956, en la ĉefurbo Hanoj okazis la unua E-ekspozicio kaj la unua prelego pri Esperanto fare de verkisto Ng-Hai-Trung kaj jurnalisto Dao Anh-Kha. Fine de 1957 estis fondita Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (V.P.E.A.). En 1959 komencis aperadi en Hanoi la kvaronjara revuo "Vietnamio antaŭen marŝas". Krome pluraj vietnamaj literaturaj kaj politikaj verkoj aperis en esperanta traduko.

Krome, en Borneo, Filipinio, Irano, Hongkongo, Malajo, Makao, Tajlando kaj Vjetnamio (suda) estas individuaj esperantistoj. UEA havas ankaŭ membrojn en tiuj landoj, Sed ekzistas ankoraŭ landoj, kien Esperanto ĝis nun ankoraŭ ne enpenetris, kiel Laoso, Kamboĝio, Mongolio ktp.

Armand Su

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## FILATELIA FAKO

S-ro Luis Mª Hernández Izal sendis al ni 5.000 uzitajn poŝtmarkojn; ankaŭ S-ro Carmelo Bello sendis pli malpli 1000 uzitajn poŝtmarkojn. Tiel do, certe tiu ĉi jaro ni gajnos premion se niaj geanoj denove helpas nin. Sendu amase uzitajn poŝtmarkojn ! Dankon al la du supre menciitaj samideanoj.

Amparo García

-o-o-o-o-o-o-o-o-

## K O N T A K T O

Ĝis nun mankis internacia junulara revuo tute en Esperanto. Do, T.E.J.O., kiel unu el siaj kontribuájoj al la Jaro de la Junularo en 1963, decidis ekeldoni specialan tian gazeton, kun la celo ne nur plibonigi kontaktojn inter siaj anoj, sed ankaŭ kunligi la tutan Esperanto-movadon pere de nova juneca idealo.

Individuaj membroj de U.E.A. kiuj ricevas la revuon "Esperanto" kaj havas malpli ol 25 jarojn ricevos la gazeton KONTAKTO senpage.

Alikaze, oni povas aboni la gazeton KONTAKO paganto nur la kotizon de 32 steloj ĉe la administrejo de U.E.A. en Rotterdam, aŭ rekte al nia redakcio.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

# HUMORAĴOJ

-Tipe itale-murmuris la amerikana turisto ĉe la okvido de Coloseo. Ili komencas konstrui en granda stilo-kaj poste ili ne havas monon por pretigi......

-o-o-o-o-o-o-

-Do, vi estas estinta en Anglujo. Ĉu vi havis malfacilajojn kun via angla lingvo ?
-Ne mi, sed la angloj!

-o-o-o-o-o-o-

-Vi fakte estas la sola homo, kun kiu oni povas paroli ĉi tie en la oficejo.
-Ĉu vi efektive opinias tion, fraŭlino?
-Jes,ĉiuj la aliaj ja estas tiel ege inteligentaj kaj kleraj.

-o-o-o-o-o-

-Panjo: Dolĉa Karlo,ĉu vi ne volus donaci vian pilkon al tiu malriĉa knabeto,kiu ne havas patron?
Karlo (firme premanta sian pilkon): Ĉu ni ne povas donaci al li patron anstataŭe?

De Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-Aviadilestro al la radio-turo: „Mi estas super la Atlantiko; mi ne povas vidi la Teron;mia benzino finiĝas. Kion mi faru? ? "
-Radio-turo al la aviadilestro: „ Ripetu miajn vortojn: Patro nia, kiu estas en la ĉielo......"

-o-o-o-o-o-o-o-

-Patrino, kial kuras patro zigzage tra la herbejo?"
-Silentu infano, kaj ŝargu la pafilon denove ! "

-o-o-o-o-o-o-o-

-Panjo, mi ne ŝatas la avinon !.
-Silentu kaj manĝu, kio staras sur la tablo!

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-Sonoras. Sinjoro Krause malfermas la pordon. Ekstere staras viro kaj demandas: Ĉu vi estas vidvino Krause?,
-Mi estas sinjorino Krause, ŝi respondas, sed vidvino mi ne estas.
-Ĉu ni vetu,ke jes? diris la viro.... Atendu,kion ni nun tuj alportos al vi !

-o-o-o-o-o-o-

-Kiun aĝon vi havas ? demandis la entombigo-entreprenisto la vizitanton.
-Naŭdek-ok jarojn, respondis la vizitanton.
-Preskaŭ ne valoras ankoraŭ iri hejmen,ĉu ne?, diris la entombogo-entreprenisto.

De Juna Germana Esperantisto

DEVO NIA de Jaime Aragaj

Ni estas amikaro
kiu venas el tre for
por vivi en frataro
kaj ami sin tutkor.

Ni agu harmonie
dum etern en nia rond'
ni restu familie
por la bono de l'tutmond'.

-o-o-o-o-

La lingvo parolata
de la plej divers´ĉies gent´
kun gravec´estas nomata
la neceso de l'moment.

Propagu ni kuraĝe
Esperanton inter homar´
Instruu ĝin tre saĝe
pere de konstanta kantar.

-o-o-o-o-o-

SI de Armand Su

Rigard´ diafana,
Harar´ kaŝtana,
Ridet´ ĉarma,
Brust´ varma.

Ŝvelanta mano
Kun arda flamo,
Sed nur la kor´
frida marmor !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

NOTAS DE SECRETARIA

Socios que han efectuado el pago de la cotización anual.

Srtas. Juanita Hernández, Mª Carmen Farreras, E. González, Angela Turnó, Elisenda Soler, Teresa Traveira, Aurora Moya y Mª Carmen Moncunill.
Sres. J. Altamira, Jorge Monistrol, J. Esteva, Diego Muñoz Roberto Font, Francisco Parareda, José Trias, Valentín Burd Amadeo Lucas, Ramón Canadell, Juan Escursell y J. Rodriguez

# MADERAS CALLAU

**Sans, 302 - Teléf. 239 05 24**
**BARCELONA (14)**

# jovani

[illegible]ión
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

**PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83**
**HOSPITALET - BARCELONA**

# ZURCIDORA

*y*

# TEJEDORA

## ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Tel. 230 29 41
BARCELONA

# ELDONEJO KOKO

Randb[illegible]lvej 4
Kopenhago - F
DANLANDO

"La Marvirineto"
*27x21 cm. bindita*
*75 paĝoj. Prezo: 30 steloj*